

FELIX TIMMERMANS



CECILJA

FEL

CECILJA

Tri poetaj romanetoj

CECILJA

Felix Timmermans

Cecilja

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro estas provlibro kaj rajtas esti kopiata libere.

MALGRANDA AŬTOBIOGRAFIO

Por pli bone kompreni la spiriton en kiu estas skribitaj la verkoj de Felix Timmermans, sekvas nun originala aŭtobiografio de la aŭtoro.

Naskiĝinta en la urbeto Lier, la vesperon de la 5a de julio 1886, mi estis la dektria el dekkvar infanoj. Loko mankis por mi en la geedziĝa libreto. Mi estis aldono, kaj tial oni simple notis sur la kovrilon miajn antaŭnomojn: Leopoldus, Maximilianus, Felix.

Mi kreskis meze de la belaj Lieraj puntaĵoj, kiuj famigis la urbeton Lier. Mia patro estis la filo de komercisto de puntaĵoj, mia patrino la filino de forĝisto. Iliaj domoj frontis unu la alian. La amo kunfandis ambaŭ.

Jam frue mi aŭdis la sukan lingvon de la malriĉaj puntofaristinoj, – kiuj liveris la neĝblankajn puntaĵojn –, ilian koloran babiladon, iliajn rakontojn.

Kaj mia patro tiel entuziasme rakontis pri Neĝulineto, pri Ruĝulineto, pri Hanĉjo kaj Grenjo, pri Jesueto kaj pri Maria kaj Jozefo, kaj ĉiam li ĉeestis ĉion kaj okazigis ĉion en nia regiono.

Estis li, kiu mortigis la lupon de Ruĝulineto. Ankaŭ la Tri Reĝoj renkontis lin, la Nigra eĉ prezentis al li salutojn por mi, kaj ĉiam mi imagis tia la vivon de Jesueto en Flandrujo.

Li kapablis kanti belajn kantojn kaj ludigis por ni eltranĉitajn marionetojn pri Doktoro Faust kaj La Leono de Flandrujo. Kaj mi klopodis imiti lin, rakontis, rimis kaj desegnis mem malgrandajn marionetojn kaj ludis komedion. Kaj baldaŭ mi mem ludis kun miaj amikoj en la mansardo aŭ en la remizo.

Mi pasigis miajn infanjarojn desegnante, legante, rakontante, kaj mi revis fariĝi artpentristo. Mi kaj aliaj amikoj, ĉiuvespere, sub la lampo, ĉirkaŭis najbaran ŝuiston, kiu sciis elpensi mirorakontojn. Ofte li tiel fanfaronis ke lia edzino, okupata pri puntfarado, eksaltis kaj interĵetis la vorton: 'Mensogulo!'.

Kaj iom post iom venis la libroj. Kaj mi frekventis la Akademion kaj malrapide mi plenigis mian paperŝrankon per desegnaĵoj, teatraĵoj, rakontoj kaj ... amhistorioj.

Kiel en ĉiu Flandro markiĝis ankaŭ ĉe mi duobla naturo, amo al realo, al voluptemo kaj inklino al mistiko, la sorĉa influo de la oriento, kaj mi okupiĝis pri ekkono de la okultismo, budismo, kabalismo kaj mi ne scias kiom da aliaj ismoj. Sed mi ne kuraĝis elekti unu el tiuj ismoj kaj vivi laŭ ĝi.

Grava operacio ĵetis min senhelpe sur la liton. Mi kredis elblovi la lastan spiron, sed mi ne faris tion, ĉar fajra vivodeziro ekkaptis min. Nova vivoĝojo stimulis min, nun ne plu por malkovri la ŝlosilon de misteroj sed de la vivo mem, por vivi danke kaj entuziasme – kaj el tio floris: *Pallierter!*


Kiam ĉi tiu verko estis finita, eksplodis en 1914 la milito, kaj denove ŝajnis al mi ke, pro la interfrata mortigo, mia vivoĝojo kunruliĝis kiel ŝtrumpo, estingiĝis kiel kandelo. En la detruita urbeto Lier, kies multnombraj vundoj atestis tiom da sufero, mi restis kun mia edzino, ŝia patrino kaj nia hundo, malgaje atendente la finiĝon de la dramo.

El la rakontoj kaj malnovaj preĝoj de ĉi tiu patrino reviviĝis, freŝaj kaj koloraj, kiel sur preĝeja vitropentraĵo, la forgesitaj bildoj de la infano Jesuo, kiujn mi ĝis tiam repuŝis en mian koron. Kaj mi mem rejuniĝis, reviviĝis kiel paska floro, kaj mi verkis *La Infano(n) Jesuo(n) en Flandrujo*.

Kaj mi aŭskultus la urbeton kaj mi aŭdis ĉiujn ĝiajn ŝtonojn kaj brilajn fenestrovitrojn rakonti. Kaj la beginejo rakontis al mi pri *La tre belaj horoj de Fraŭlino Simforoza*, begineto kaj mi rerakontis tion. Tiel eklumis *La Kandelo en la Lanterno*. Tiel *La Paroĥestro de la floranta Vinberujo* naskiĝis en mia fantazio. Tiel mi malfermis la *Kristnasko(n) Triptiko(n)* de la sanktaj Tri Reĝoj, kaj skizis la biografion de Bruegel, kaj tiamaniere mi pli kaj pli fariĝis verkisto, kio komence ne estis mia intenco. La farboj malmoliĝis en la tubetoj, kaj mi ja tiel volonte pentris. Sed mi ĉiam devis prokrasti tion.


Al Cecinjo, mia filineto

La aŭtoro

P
gela 

Ceciljan mi vidis veni

tradukis Lode Dores



1.

Je la mateniĝo mi starigis min en mian pordon.

La domo kuŝas solece ĉe la rando de pinarbaro, ĉe meandro de rapida rivereto.

La tutan nokton via bildo leviĝis en miaj sonĝoj. Kaj nun mi venis eksteren por laŭte ekkrii kaj kanti, kiom ravige mi amas vin, Rulinda.

La mateno al tio adaptiĝis kaj prepariĝis.

La orienta ĉielo estas ŝtuparo de oro kaj glorie suprenetendas kolonojn.

La mateno estas palaco. Kristalaj sonoj gutas.

La aleoj, kondukantaj al la abatejo, plenplenas de incenso kaj la kunikloj aŭskultas en trifolikampo.

Rulinda, mia sopiro vokas vin, kaj mia fantazio promeniĝas vin tra ĉi tiu perlita pejzaĝo, en brokata vesto; ĉirkaŭ via kapo flirtas vualo de strange falditaj flugiloj kaj vi kantas el ebura breviero.

La tago estas perlamota konko ĉirkaŭ viaj okuloj.

Je ĉio, kion mi vidas kaj aŭdas, vi eniras mian menson kaj mia adoro envolvas vin en la plej mirindajn kostumojn.

La plej helajn stelojn mi pendigas ĉirkaŭ vian kolon, viaj vestaĵoj estas de lunlumo kaj ĉielarkoj.

Via staturo estas ĉie kvazaŭ sonorado kaj fojna aromo.

Kaj plu la arboj estas orgentuboj kaj la tula skeleto de velkinta folio estas desegnaĵo de sanktulo, kiu provis kopii Dion.

2.

Depost dek kvin tagoj mi loĝas nun en Kampino, por resaniĝi per la balzamo de la pinarbaroj, por vi, Rulinda.

Kaj baldaŭ, antaŭ ol falos la unua neĝo, ni geedziĝos.

Nia vivo al tio sopiras kiel malsanulo al la mateno.

Via nupta robo pendas preta; la servistino ĉiusemajne briligas la klinkojn de nia domo, kiu reve staras meze de betuloj.

Kial mi devis tiel grave malsaniĝi unu monaton antaŭ nia geedziĝa festo?

Niaj okuloj ne kapablas rigardi en la sunon, kaj Dio estas tro radianta, por ke ni sekvu la gestojn de lia volo.

Sed Li kunigos niajn korojn kaj el du malsamaj vinberaroj preparos unu bonan vinon.

Ni estas destinitaj unu al alia ekde nia junaĝo. Du branĉoj, kiuj kapablas ekflori nur apogante sin reciproke.

Kiam ni ludis kune, niaj gepatroj diris unu la alian: „Tio certe fariĝos geedziĝo.”

Tiam mi tondis por vi kartonajn kronojn, volvis vin en silkan ŝtofpecon, ĉirkaŭvestis vin per kurteno kaj ornamis vin per staniolo kaj komunibildoj.

Ĉiam mi volis vidi vin kiel anĝelon, princinon, elfon el fabeloj.

Por vi mi volas resaniĝi kaj alkroĉiĝi al la vivo.

Sen vi mi ne vidas vojon, nek montetojn en la malproksimo. Tiam mi estas deŝirita folio.

Tiukaze mi preferus kviete estingiĝi ĉi tie, kaj morti je morna dimanĉo,

dum la monaĥoj en la abatejo kantadas la nokturnojn.

Vi estas la roso, kiu revivigas min; miaj fingroj sorbas la brilon de la ĉielo en mian sangon.

Kaj tamen mi nombras la tagojn, pacience kaj singarde kiel virino malvolvante faskon de lanfadenoj.

Mi ne volas ektimi sur la vojo al nia feliĉo.

3.

La gefarmistoj, ĉe kiuj mi loĝas, havas la karakteron de la pano, de kiu ili faras buterŝmiritajn tranĉaĵojn por mi. Ili semis kaj falĉis la grenon, el kiu ili mem faras panon.

La pano estas peza kaj malhela.

Ili ankaŭ iom similas al bovino kaj kaprino, kaj al la bestoj, kun kiuj ili vivas.

Tiuj du homoj nemulte diras, kelkfoje ion pri la farmbieno kaj tiam ili ne rigardas unu la alian. Estas kvazaŭ ili parolas en la mallumo.

Iliaj okuloj nenion plu scias diri al iliaj animoj.

Kaj mi, Rulinda, kiu drinkas vin per miaj okuloj!

Mi levas la manojn al venonta dimanĉo, kiel al bela muziko.

Ni promenos tra la molaj arbaroj. Ni iros al la meso en la malnova abateja preĝejo, kie honore al Dio sur la muroj estas skulptitaj grandaj korboj da fruktoj. Ni promenos al la mistera lageto, meze de la arbaro.

Tie antaŭ mil jaroj dronis princino. Je certaj vesperoj oni vidas brileti sur

la akvo la oron de ŝia krono.

Maljunaj homoj vidis en antaŭaj tempoj, kiel blankaj monaĥoj nokte venis kanti Libera nos Domine ĉirkaŭ la laĝeto.

Neniam homo venas en ĝian proksimon.

Mi volonte sidas tie revante pri vi kaj tiam mi imagas vidi vian kapon nebule emerĝi el la trankvila, malsana akvo.

Ni iros ankaŭ sur la Monaĥin-monteton, kiu portas nun purpuran mantelon.

Tie oni havas klaran panoramon super vastan Kampino.

Ni devas esti tie je la krepusko, kiu orumas la pejzaĝon, kiam de la abatejo kaj de ĉiuj preĝejaj turoj la anĝeluso sonoros super la regiono.

Tiam ni preĝu kune.

Kun vi, Rulinda, la vivo estas kanto.

Mia koro radias kiel la rosero sur la lanugo de ruĝbrasikfolio.

4.

Mi trovis ĉi tie bonan amikon ĉe miaj promenoj, la instruiston de la vilaĝeto.

Li estas longa, osteca kaj pikbarba.

Tamen liaj okuloj estas puraj kiel de infano.

Li skribas libron, kiun li nomas: „La Kanto de Dio”.

Liaj okuloj rigardas kvazaŭ li ĉiam aŭdas kanti ĉirkaŭ si.

Li loĝas ie profunde en la pinarbaroj, kaj estas kiel sanktulo, plena de molkoreco por la bestoj, la floroj kaj la infanoj.

Tamen en la lernejo li estas tute alia homo.

Tie subite li fariĝas kolerega kaj ekbolas pro bagatelo. Li furiozas kaj bruegas, blasfemas, frapas kaj skuegas freneze la incitenajn kamparanidojn, kiuj nomas lin „Apro”.

Tamen denove en la silento kaj la soleco de la arbaroj, li estas la milda admiranto, la aŭskultanto kaj la poeto de la Kanto de Dio.

La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be

La tre belaj horoj de fraŭlino Simforoza, begineto

tradukis Pierre Anselme





a vinberujo

La aero estas malsekete arĝenteca, kiel la dorso de fiŝo.

Je tiaj tagoj ŝvebas en la ĉielo belaj nuboj diversformaj kaj dum la suno tie ĉi enigas lumfingron tra la fenestroj, jen staras tie fore super la kampoj hela peceto da ĉielarko.

Estas nun tempo por kultivi la ĝardenon. Tiucele la begineto ¹ Simforoza venigis al sia korteto la ĝardeniston Marteno, la nevon de lia vikaria moŝto, por prepari la legombedojn, planti florojn kaj pritondi la belan vinberujon.

Li venis surhavante sian ruĝan dormĉemizon sub sia blua kitelo, kaj dum li aktivis tie kaj jene, liaj okuloj ridas al la farenda laboro.

Simforoza staras apud li kun sia pinta nazeto, observante lian faron; ŝi triketas blankan ŝtrumpon kaj abunde paroladas pri la vinberujo.

Tiu ĉi estas certe tiom malnova kiom la strato, tendena kaj nodoplana, kaj ĝi rampas inter la malantaŭa pordo kaj la fenestro, rekte supren ĝis la paserpoto ². Tie ĝi abrupte disvastiĝas, kvazaŭ ventumilo, ĉiudirekte sur la bruna, malseketa muro.

Sed ĝia animo estas eksterordinare sentiva; kiam ĝi antaŭsentas la printempon, tuj ĝi ekkreskas alten, kaj en la monato oktobro ĝi portas la plej belajn blankajn vinberojn en la ĉirkaŭaĵo de almenaŭ sephora paŝdistanco.

Marteno ridetas per unu flanko de sia buŝo, ne bone sciante kion diri en ĉeesto de ina homo.

Estas ja la unua fojo, ke li laboras ĉe fraŭlino Simforoza. Li loĝas nur de

antaŭ kelkaj monatoj en la beginejo, kaj antaŭ tiu tempo li deĵoris kiel ĝardenisto en la kastelo apud Turnhout; sed lia onklo, la vikario, opiniante, ke ne estas konvene por junulo dudekkvinjara tutan tempon resti sola kun la knabinoj de la kastelo, venigis lin al la beginejo.

Tie ĉi li laboras nun proprakonte kaj facile gajnas sian vivtenon, loĝante sola en domo en la Hela Strateto malantaŭ la fera krado.

Simforoza estas fiera vidi tiun viglan ĝardeniston en sia ĝardeneto; ŝi sentas sin bonhumora en lia ĉeesto, kaj ŝi prokrastas siajn preĝojn ĝis la vespero.

Ŝi perceptas en li belan junulon, kvankam li havas iom longajn brakojn. Lia vizaĝo estas brila kaj rozkolora kaj malsupre larĝa.

Li havas du helajn, bonajn hundokulojn, kiuj daŭre ŝajnas ridi, kaj mallarĝan buŝon kun dikaj ŝmacaj lipoj, kvazaŭ li estus ĵus manĝinta bongustan lardon.

„Ĉu vi hazarde ne soifas, Marteno ?” tre kompleze demandas al li Simforoza, ne sciante, kiamaniere ŝi povus plezurigi lin.

Iom levante la ŝultrojn, li modeste malakceptas kaj aldonas ridetante: „Ne estas tiom necese, Fraŭlino !”

Sed jam Simforoza estas for; baldaŭ ŝi hastapaŝe reaperas, portante dikan glason kaj grizan terakotan kruĉeton. La senŝaŭma ruĝe bruna biero respegulas ŝian blankan kapuĉon kaj eĉ la tutan korteton, kaj dum Marteno trinkas, ŝi rigardas kun miro lian gorĝonodon, kiu dum la trinkado leviĝas supren malsupren.

„Jen trinku unu plian da ĝi !” ŝi diras, kiam la glaso estas malplena.

Li konsente ridas, rigardas ŝin en la blanke palpebrajn okulojn, fermas tiam la siajn, iomete embarasite, kaj eltrinkas la duonon de la ĵus enverŝita enhavo.

Pigramove li ree supreniras la eskalon kaj denove eklaboras tie, dum Simforoza plu trikas.

Ŝi iĝis pli silentema. Ŝi demandas al si, kial li rigardis ŝin tiel. Vekiĝas ĉe ŝi neeldirebla, stranga sento, tiel ke ŝi ne plu bone scias, kiamaniere ŝi de nun alparolos lin. Ŝi serĉas bonan, taŭgan vorton por diri, sed ne trovas ĝin.

Estas kviete kaj silente; venteto skue faligas de la deflueja beko ĉe la tegmento iom de la tie restanta pluvakvo, kiu peze kaj brue enfalas en la profundan pluvakvujon sube.

Iom tro laŭta klakado de pordo en la najbarejo tuj forflugigas ekfajfantan merlon el la pomujeto.

Kave kaj metalece sonas rapida paŝo en la mallarĝa „Ĉemizmaniko”³, kiun bare interrompas la hederokovrita muro de la korteto, kaj jen malfermiĝas la murpordeto, vidigante la blankan kapuĉon kaj la grandajn nigrajn okulojn de fraŭlino begino Mushundo. Unue ŝi kapsalutas trifoje al Simforoza kaj tuj poste diras al Marteno, presente al li malplenan botelon: „Bonvolu pendigu tiun ĉi botelon al la vinberujo, vinberuja suko estas ja tiom bona por la okuloj! Fraŭlino Pelo diris al mi, ke Marteno pritondos ĝin, do mi profitos la okazon!”

Pri fraŭlino Mushundo, kiu daŭre postsopiras la tempon, dum kiu tri cent beginoj loĝis en la beginejo, oni ne scias kiam ŝi ekbabilas, kiam ŝi ĉesos babili, tiom babilema ŝi estas.

Simforoza eliras suspiron, dirante ke ŝi devas meti la kaldronon sur la fajron por prepari la kafon.



„Ne ĝenu vin pro mi, fraŭlino!” ridas fraŭlino Mushundo.

Simforoza nun perdis sian bonhumoron. Ŝi eliras la Sanktan Margaretinstraton, kie troviĝas akvopumpilo. Kiam ŝi revenis, feliĉe fraŭlino Mushundo estas for, kaj la boteleto pendas sur la pritondita trunketo.

En la blanka kuirejo la akvokaldrono fajfadas kaj kantas kvazaŭ honore al la krucifikso farita el testudo kaj Simforoza volonte demandus al Marteno,

ĉu li deziras enveni kaj eksidi ĉe la manĝotablo, sed la regulo malpermesas tion, ŝi do alportas al li tasegon da varma kafo.

Kaj dum ŝi sidas en la kuirejo, formanĝante la tri maldikajn buterpanetojn kun tri anglaj figoj, tra la kurteno ŝi rigardas al Marteno, kiu kaŭre sidas kaj senhaste enbuŝigas siajn panon kaj fromaĝon.

Ŝi rapidas por tuj fini la manĝadon, kaj jen denove ŝi staras, trikante apud lia laborloko.

Kun bedaŭro ŝi aŭdas lin diri: „Jen, estos farita por hodiaŭ.” Kaj fakte okazas tiel.

Dum ŝi pagas lin, ŝi devas bone atenti, ĉar kiam iĝas malhele, kaj kalkulante ŝi tuŝas liajn dikajn manojn, sed ŝi tuj retiras la siajn.

Ŝi vidas liajn ruĝan buŝon kaj klarajn malhelajn okulojn.

„Bonan vesperon, Fraŭlino!” li diras ridante. „Ĝis venonta jaro verŝajne. Ni esperu, ke la vinberoj fariĝos bonaj!”

Aĥ, jaro daŭras tiom longe! Ŝi pensas depremite. „Nu,” ŝi postkriis al li, „kiam la vinberoj estas maturaj, vi ricevos la plej belan grapolon!”

Kaj nun ŝi staras sola en la korteto. Bona terodoro leviĝas. La vespero kvazaŭ eliĝas el la grundo. Ĉie estas kviete, la ĉielvolbo estas malhele blua, kaj sur ŝi venas granda soleco. Kaj Marteno ne estas ŝia frato? Ŝi eĉ imagas pli... Sed pinĉe ŝi fermas la okulojn. Ne! Ne tio! La sango ekfluas al ŝia kapo. Ŝi pense jam vidas la genajbarojn frapantaj sur kaldronojn, kaserolojn kaj potkovrilojn.

„Kaj se mi iam volus!” ŝi murmuris pro ekribelanta emocio. Sed precize tiam tintas la preĝiga sonorilo, laŭte kaj ronkece, kaj tio penetras ŝian koron dolorige. Kaj ŝi preĝas surgenu la „Anĝelo de l' Sinjoro”.

Kiam ŝi reekstaras sin, aperas la luno kun siaj arĝentecaj radioj implikiĝantaj meze de la maldensa pomarbeto. Ŝi ektimas kaj demandas sin: „Ĉu mi hodiaŭ ne faris pekon?”



La sonoriloj revenis el Romo.

Ili kantadas kaj jubilas super la urbo, kaj ili sonadas kaj ĝojkriegas super la hela beginejo.

La impetega vento ekkaptas la sonojn, reĵetas ilin pli alten, disŝiras, faligas, rekaptas kaj rompe blovegas ilin kontraŭ la hastemajn nubojn, la kamentubojn kaj la branĉaron de la grumblantaj arboj.

Morgaŭ estos Pasko. Tiam la ĉielo estos denove malfermita kaj nia bona Dio Sinjoro Jesuo Kristo reestos en la preĝejoj kaj inter la homoj. Tiam ekaŭdiĝos muziko kun la granda orgenludo kaj intermiksiĝantaj beginetvoĉoj !

Jen belega tago por kristana koro ! Ĝi purigas vin el la pekado, igas vin tiom senkulpa, kiel mamsuĉanta ŝafideto, kaj tiel brila, kiel spegulo; oni spirite rejuniĝas, kvazaŭ akiras freŝan sangon; la animo estas lavinta sin, surmetinta novan vestaĵon kaj denove iradas trankvila en la odoro de pieteco kaj pardoniteco, kvazaŭ neniam plu estos malbono.

La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be



a Kalvaria vojo

Silenta estas la beginejo post la tagmeza horo.

Matene la vilaĝanoj kaj ankaŭ la beginoj faris siajn aĉetojn ĉe la foiro kaj en la magazenoj.

Nun ĉiuj sidas dome, kaj la arda suno brilas nur al la fermitaj dompordoj.

Korniko sidas sur la kupra koko de la preĝejturo kaj super la pala stratpavimo dancadas musetoj.

La ĝardenetoj antaŭ la domoj estas plenaj de kamparanaj floroj, kaj dum la potenca suno disradiadas, ekploretas la okuloj pro troa lumo.

Tie estas sambukoj, violoj, peonioj, heliotropoj, fortaj kaj akraj kaj ebriigaj pro siaj koloroj.

Simforoza taksas la horon bela por laŭiri la kalvarivojon. Tiu vojo konsistas el bildetoj tie kaj tie ĉi alnajlitaj malantaŭ kradeto subtegmenteta, sur la muro de domoj aŭ de la preĝejo.

Ili estas malnovaj, molaĉiĝintaj, iom naive pentritaj kaj la tempo ŝiretis, distordis kaj eĉ diskvamigis ilin.

La unua haltejo troviĝas ĉe la placeto de la „Kalvarimonteto”, kie en dekliva korteto plena je violoj kaj mirtetoj sub blua lignaĵa tegmenteto nia Sankta Dipatrino sidas kun la mortinta Jesuo sur la sino.

Tiu unua haltejo reprezentas la kondamnon. Pilato kaj Jesuo en sia anguleto fariĝis nur palaj figuroj pro la sunradietoj, kiuj tien foje brilas, dum en la alia angulo oni povas vidi trans la pordo de palaco, freŝan, al fontaneto kondukantan veran aleon.

Preĝinte tie, Simforoza salutas la grupeton da suferantoj kaj enpaŝas en la Sanktan Margaretino-straton.

Kontraŭ la muro de la preĝejo, en bone kradigita dometo, sidas dika Dio Sinjoro; li surhavas purpuran, verde orlitan mantelon kaj el liaj kunmetitaj manoj elstaras fera kantrunko.

Tiu Jesuo-figuro havas grize brunajn lipojn, liaj okuloj amare kaj malgaje rigardas flanken. Tiu statueto ĉiam timige impresas Simforozan, precipe vespere, kiam lumas antaŭ ĝi la granda lanterno. Kaj post kiam ŝi estas eldirinta ŝian „Patronian”, ŝi ekiras al la dua haltejo, ĉe la alia flanko de la preĝejo, tie legante sub la bildeto:

„Vi portegas, Bona Di’,
tion, kion devus porti ni,
Vi portegas la kulparon
de ni portendan.
Faru, Bona Dio Sinjoro,
ke ni pro niaj kulpoj
nian krucon
ĉu etan, ĉu egan
portu kun pacienco.”

Poste ŝi venas en la Pumpilo-strateton kun ties blue kalkumitaj muretoj, super kiuj pendas forsitio, kaj ŝi revenas rekte al la Kanaletoflanko, kie ĉiuj domoj estas similaj : el ruĝaj brikoj kun blankaj strioj, rondaj pordoj kaj feraj stangoj ĉe la altaj fenestroj.

Sur la pordojn oni pentris nomojn tiel: „Sur la Monto Olivarba”, „Ĉe la

Dolĉa Nomo Jesuo”, „Sur la Monto Patmosa”.

Ŝia koro ekbategas, ĉar ŝi estas tuj preterpasonta la domon de Marteno. Ŝi ne vidis lin jam de longe, sed ŝia koro por kaj pro li ne restis kvieta eĉ dum unu minuto. Li retiriĝis en monaĥejon apud Antverpeno, sed antaŭhieraŭ li rehejmiĝis. Ŝi ne povas plu nei tion al si mem, sed kiam ŝi ne vidis lin dum du tagoj, estas kvazaŭ la tuta mondo malinklinas al ŝi.

Se ŝi nur povus iom vidi lin hodiaŭ! Nur iomete! Tiam ŝia koro trankviligus kaj tiu sento de soleco malaperus. Sed kial tiom bategas ŝia koro? Ŝi ja faras nenian malbonon, ĉu? Cetere ŝi estas begino, kaj do rajtas plu elekti inter geedziĝeco kaj religia vivo. Sed ŝi ne volas pripensi la aferon, ŝi forskuas tiujn pensojn de sub sia blanka kapuĉo kaj haste paŝas de iu haltejo al alia.

En la Purgatorio-strato loĝas lia moŝto vikaria, la onklo de Marteno; ŝi vidas lin sidanta malantaŭ sia fenestro, la pergamenecan kapon klinita super libro. Alte super la domo elstaras la dikaj arboj ĉe la begineja muregaro, kaj la pordo en la muro estas malfermita kaj vidigas gotikan panoramon kun malproksima Neto kaj la bluaj turoj de la fora urbo Meĥleno.

Sed nun Simforoza devas iri en la Infero-straton, kie loĝas Marteno.

Ŝi estas tute emociita, ŝi paliĝas kaj ruĝiĝas kaj spiras malregule.

Marteno staras en sia ĝardeno, laborante inter siaj rozoj.

Li surkape havas vastan sunĉapelon kaj surpiede flavajn lignoŝuojn.

Ŝiaj paŝoj sonas hele en la suna malbrueco kaj Marteno levas la okulojn.

„Hej, bonan tagon, fraŭlino Simforozin’,” li kapklinante iom, timida salutas ŝin kaj ĉar ŝi diras nenion, li aldonas: „Vi promenas nun en tia sunvarmego?”

Simforoza plu staradas tie, dirante per trematanta voĉo:

„Ne estas grave, oni pretersentu tion, por ne senti tion! Ho, kiom belaj floroj !”

„Sed mi kutimiĝis al la suno, fraŭlino,” li revortas ruĝigante. “Mi vivas de la suno, kio iĝus el mi kaj miaj floroj, se ne estus la suno...?”

„Jen, metu tiun ĉi en vazeton dome,” li diras donante al ŝi malhele flavan kaj karminrandan ruĝan rozon ‘Gloro de Dîjono.’

Simforoza jam ne scias kion fari pro li kaj la rozo kaj subite volas ion diri, kio koncernus lin.

La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be



Kaj nun estas la antaŭlasta tago antaŭ la foriro de Marteno al la Brunaj Monaĥoj. Simforoza ne sentas sin tiom bonfarta je tio, kaj ŝi preĝas al nia bona Dipatrino, por ke tiu faru ŝin forta, ĉar hodiaŭ la procesio okazos.

La vetero estas tre favora.

La ĉiela baldakeno estas plene blua kaj oreca kaj arĝentkolora pro la blankaj, purpurventraj nuboj.

Ĉiu ĉi lumo staras rekte super la hela beginejo kaj estigas sparkojn kaj radiojn el la kupraj kaj vitraj kandelingoj starantaj sur la fenestrobretoj aŭ sur tablo, kovrita de blanka tuko, apud statuo de sanktulo kaj vazo entenanta bonodorajn florojn.

La flagoj flirtas ĉe la ŝtuparformaj frontonoj, la flamoj balanciĝas sur la kandeloj, la strato estas plena je koloraj paperpecoj kaj blanka sablo kaj la fenestrovitraĵoj kaj eĉ la gamboj tremetas pro la resonanta sonorilbruado.

Jen ĝi! La homoj ekstaras rande de la mallarĝaj stratoj aŭ sur la sojlon de la domoj kaj ĉe dolĉa, solena kaj tamen vigla muzikbruo proksimiĝas la bela procesio.

Antaŭ la sankta hostio paŝas Simforoza, la lasta el la beginoj, kiuj kun la blanka tuko antaŭe sur la kapo kaj la verda vaksokandelego enmane formas en du vicoj la honoran gvardion. Antaŭ si ŝi vidas, bela kaj freŝa kiel matura sapveziko, la tutan irantaron de la virgulinoj, flagojn, lanternojn, malnovskribajn P literetojn, sanktulfigurojn kaj relikvuojn, kaj post si, en nebulo el bonodora incenso kaj arĝenteca sonoriletotintado kaj latinlingva kantado, paŝadas sub blua brokata baldakeno la granda, dika pastro, kiu levas antaŭ sia ruĝa vizaĝo kun duobla mentono la radiantan hostiujon.

La baldakenon super la pastro portas kvar junuloj en ruĝa jupo kaj blanka ĉemizeto, kaj tiu, kiu paŝas tuj post Simforoza estas Marteno.

Simforoza scias tion, sentas tion, kaj ŝi pro tio ne povas preĝi, kaj kiam ŝi devas kanti, ŝia voĉo blokiĝas en ŝia gorĝo.

Ve, kiom malsamece estas hodiaŭ kompare al la antaŭa jaro! Kiom feliĉa estis tiam sia juna koro pro tiuj incensodoro, koloroj kaj kantado! Kiom fieraj kaj ekstazaj tiam ŝi sentis sin! Nun ŝia koro estas maltrankvila. Ŝi ankoraŭ amas Martenon, kaj ŝi maldikiĝis pro tio.

Ŝi ne plu vidis lin; kvazaŭ musineto ŝi restis dome, ĉagrenita kaj hontigita; rapide ŝi iris al la diservo kaj tuj poste revenis hejmen, haltante nenie, kaj ŝi faris siajn aĉetojn tagmeze, kiam ĉiuj sidas ĉe la tagmeza manĝotablo. Ŝi timis, ke eble Marteno disrakontis la okazintaĵon. Vidante aretojn da homoj babilantaj kune, ŝi pensis, ke oni klaĉas pri ŝi. Ŝajnis eĉ al ŝi, ke la fraŭlino sakristianino moke rigardas ŝin kaj la beginestrino deturnis la kapon de ŝi. Post semajno tamen ŝi povis konstati, ke Marteno klaĉis nenion al iu ajn, kaj tiam defalis dika ŝtono de sia koro. Tio liberigis ŝin kaj ŝi povis denove reiri al la aliaj homoj. Jam ŝi timis esti elpelota el la beginejo aŭ ricevi severajn admonojn de la pastro. Kiel dirite, neniu eksciis pri tio.

Tamen ŝi evitis Martenon. Ŝi ne kuraĝis aperi sub liaj okuloj kaj ŝi laŭiris plu la Kalvarian vojon nur en la preĝejo.

Dume ŝi kunportadis kun si egan ĉagrenon kaj kvankam ŝi parole kaj pro Dio akceptis la proksimiĝantan adiaŭon de Marteno, en sia koro tamen ŝi ne povis forgesi lin, kaj la aflikto pro lia eterna foresto estis kvazaŭ dorno en ŝia karno. Ŝi restis tagojn kaj noktojn kuŝanta, cerbumante pri tio, kaj multaj larmoj defluadis de ŝiaj palpebroj kaj blankaj okulharoj.

Ŝi do ekde la donaco de tiu bela rozo "Gloro de Diĵon" ne plu volis vidi lin, sed nun ĝuste iris al li, kiun ŝi amis, tuj malantaŭ ŝi, kun siaj koro kaj animo pretaj eniri por ĉiam en monaĥejon. Ŝi ne plu vidis lin kaj aŭdis, ke li jam havas iom da barbo, kio cetere aspektigas lin tute ne malbone.

Nun ŝi volus retrorigardi al li, sed ŝi ne kuraĝas fari tion pro la homoj kaj pro li mem, kaj ankaŭ ĉar tio malplaĉus al Dio.

Hontoruĝo jam vidiĝas sur ŝia glata, granda frunto, kaj kvazaŭ ŝi per tio volus rezisti al la tentado, ŝi fikse kaj persiste rigardadas la dikan flamon, kiu fumaĉante kaj pendante ŝanceliĝas sur la torĉo. Ŝia kapo estas varmega, kvazaŭ ĝi devus eksplodi, ŝia sango pulsegas en la arterioj kaj ŝi timas, ke okazus al ŝi malfeliĉaĵo.

La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be

La pluvo milde faletas sur la tegmentojn. Fraŭlino Simforoza atendas Martenon interne de la beginejaj muroj.

Ŝi tordas siajn manojn pro angoro, ĉu li venos aŭ ne?

Hieraŭ vespere ŝi transŝovis letereton al li sub lian pordon, dum estis lumo malantaŭ lia fenestro kaj en tiu letero oni povis legi la jenon: „Marteno, antaŭ kiam vi foriros al la monaĥejo, mi nepre devos diri ion al vi. Venu ĉirkaŭ la oka al la beginejo tie, kie staras tri blankaj betuloj. Mi atendos vin tie. Fraŭlino Simforoza. Diru al neniuj pri tio kaj dispecigu tiun ĉi letereton.”

Ĉu li venos aŭ ne? Maltrankvile ŝi paŝadas tien kaj reen sub la alta, rekta muraro de la beginejo, sur kiu la pluvo plaŭdetas.

Ŝia gorĝo estas seka kaj ŝia koro estas nun ne pli granda ol fabo. La vespero venas en la ĉielo kaj jam ŝvebas en la arboj. Merlo akompanas per klaraj, akvecaj sonoj la dolĉan pluvkanteton.

La begineja ĉirkaŭmuro estas kiel preĝejo, de kiu la arboj estus la kolonoj kaj la pejzaĝo la koloritaj vitraloj .

Kaj Simforoza estas angora kaj ĝoja; angora pro la atendo kaj espero, kaj ĝoja pro la pluvo. Ŝi taksas tion ĉi granda oportuneco. Nun venos ja neniuj promeni tien ĉi, nek la pastro, nek begino, nek iu ajn alia el la beginejo, kaj neniuj vidos ŝin paroli kun Marteno. Nu, ĉu tio fakte gravas? Ĉiu ajn pensos, ke estas nur hazardaĵo; kiu ja konkludos ion ajn el konversacio inter begineto kaj junulo, kiu morgaŭ fariĝos monaĥo?

Iam kaj tiam falas akvo-ŝprucaĵo sur ŝian blankan mantelon. Ĉiam denove ŝi repaŝas preter la tri blankaj betuloj. Ankoraŭ li ne estas tie, sed ja ankoraŭ ne sonis la oka. Ve, kiom daŭras la tempo! Ŝi ekbedaŭras, ke ŝi skribis al li. Ŝi opinias tion iom aŭdaca fare de begineto, sed nun tio estas faritaĵo kaj al tio jam ŝi ne povas ŝanĝi ion ajn. Ŝi volus reiri domon, sed kion pensos Marteno pri tio, se li venos?

Plej bone estus, ke li ne venu; ve, ŝia koro estas tiom plena de angoro!

Kio okazos? Dio scias, kiom kolera li estos. Kion li devas pensi pri ŝi? Tial estas eble pli bone, ke li venos, tiam ŝi povos diri ĉion al li. Jes ja, ŝi devas tion diri al li, ŝia koro superfluigas, ŝi povus diri tion eĉ al seĝo.

Aĥ, kun tiom da plezuro ŝi ja vidas lin! Kaj dum ŝi tien kaj reen promenadas preter la tri betuloj, kiuj blanke reliefigas sur la malhela muro de la beginejo, ŝi mense ripetadas la vortojn al li dirotajn.

Trenige la sonorilo eligas ok sonojn kaj subite Simforoza aŭdas paŝon malantaŭ si. Ŝi ne kuraĝas returni sin, ŝi plu staras sur la sama loko; ŝi sentas la sangon deflui al siaj gamboj.

„Ĉu vi?” demandas la milda, kvieta voĉo de Marteno.

Tiam ŝi turnas sin al li kaj murmuras per hezitanta voĉo:

„Saluton, Marteno.”

Li rigardas ŝin kun miro, kaj en la duonombro ŝi vidas en lia rido liajn grandajn, blankajn dentojn.

„Jes...” li hezite respondas, ridetante per unu flanko de sia buŝo. “Kial vi...” sed li ne kuraĝas daŭrigi, ĉar ŝi honte tenas la okulojn malsupren. Li aŭdas ŝin plorsingulti kaj li vidas ŝin forigi larmojn el siaj okuloj per sia montrofigro.

„Aĥ, Marteno !” ŝi ploretas... kaj subite ŝi ekploregas kun la manoj antaŭ la vizaĝo. Marteno ektimas kaj ne scias, kion diri. La pluvo bruetas milde sur la foliaro kaj ĉio alia estas senbrua.

„Kio okazas do, Simforozin’ ?” li riskas demandi ŝin, dum li tiretas la maldensan hararon de sia ĵus ekkreskinta barbo.

Simforoza rigardas lin petegante. „Nun vi estas forironta por ĉiam, Marteno?”

„Jes. Simforozin’,” li diras ĝojigita, „kaj mi multe preĝos por vi!”

Ŝi fermas la okulojn kaj ridetas amare.


„Dankon, Marteno, mi dankas al vi.”

Li ne komprenas ŝin, tion ŝi sentas, tion ŝi aŭdas, kaj ŝi ne estas kapabla malfermi sian tutan koron antaŭ liaj klaraj okuloj.

Ŝajnas al ŝi, kvazaŭ aleno traborus ŝin, la larmoj deglitas laŭlonge de ŝiaj manoj kaj subite ŝi ekprenas lian grandan, varman manon.

„Saluton do, Marteno, adiaŭ!” sonas singultante, tremetante el ŝia gorĝo, dum pluvekfalo disŝprucas sur iliaj manoj. La merlo plu kantas kelkajn forgesitajn notojn, kaj trans Neto muĝas bovino.

„La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be



Simforoza plezuriĝas je sia laboro.


Ĉar ŝi estas ankoraŭ juna, ŝi devas matutine ellitiĝi por preĝi en la preĝejo, poste ŝi iris al la lavejo, kaj nun la aero estas flava pro la forŝoviĝanta suno kaj la laboro estas farita. Ŝi sidas rigardante ĝin de la benko, kiu troviĝas antaŭ la gipsa statuo de Nia Disinjinorino. Ŝiaj fingroj sulkiĝis, estis sensangaj kaj eĉ iomete vunditaj, ŝia dorso doloras, sed en sia animo ŝi portas mildan pacon.

Lanuge oreca kiel flava pruno estas la kvietita krepusko, la rozoj forte odoras je tiu horo, kaj de la ŝnuroj pendas malseka, peza kaj blueca la lavitaĵo. La littukoj, kovriloj kaj ĉemizoj eligas freŝan odoron el lavendo, blankigilo kaj Marsejla sapo.

Ĉio pendas tie tiom blanke pura, ke estas plezuro tion vidi.

La anĝeluso tuj eksonos.

**La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro,
kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be**



Kiam blua nebulo kiel fajna incenso ŝvebas antaŭ la muraro kaj la kupreca suno teksas super la kampoj fadenojn, kiuj restas pendantaj en viaj hararo aŭ vizaĝo, kiam estas kviete kaj silente en la flava foliaro, kaj oni aŭdas el la arbaro la resonadon de ĉasistpafoj, tiam alvenis la tempo por kolekti la vinberojn, ĉar ili estas maturaj kaj dikaj kaj portas en sia karno la lumon de l' suno.

La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be



Ekstere estas nur neĝo kaj malheleco.

**La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro,
kiu estas akirebla ĉe www.retbutoiko.be**



a pilgrimo

Simforoza ricevis de la beginestrino la permeson fari pilgrimon al la mirakla statuo de sankta Antonio. Ŝi preferus iri je dimanĉo, sed ĉar la beginoj dimanĉe ne rajtas forlasi la beginejon escepte en kazo de nepreco, ŝi ne kuraĝis peti la pastron pri tio...

**La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro,
kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be**

Kristnaska Triptiko

tradukis Eugeen Paesmans



LA CENTRA PANELO

La antaŭan tagon dum la vesperiĝo en la falanta neĝo, kraketanta loĝveturilo, trenata de maljunulo kaj hundo, preterpasis la ŝoseon.

Malantaŭ la fenestreto oni ekvidis la palan vizaĝon de gracila, juna, graveda virino kun grandaj, tristaj okuloj.

Ili preterveturis, kaj kiu ilin vidis, ne plu pensis pri ili.

**La cetero de tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro,
kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be**

LA MALDEKSTRA PANELO

Denove estis Kristnasko, kaj la paŝtisto Suskewiet, kiu ĉiujare kun Pitjevogel kaj Schrobberbeeck reprezentis la tri Reĝojn, kaj trioje kun kartona stelo kaj belaj malnovaj kantoj vizitadis la farmobienojn, kuŝis nun malsana en lito, kun la ombro de la morto sur si. En la angulo, ĉe la muro apogiĝis la kolora, ligna stelo, kaj pendis lada krono.

Li kuŝis tie, kie li ĉiam kuŝis, en la ŝafejo.

Tra malgranda fenestreto apud la lito, li povis vidi la neĝkovritan malproksimaĵon, sur kiu la duonluno, kiel arĝenta bobeno, venis por teksti la belan stelvestaĵon.

Estis la unua Kristnasko dum kiu li ne povis iri kun siaj kamaradoj. Ili nun iris duope, kaj ankoraŭ ĉiam kantadis: „Ni estas tri Reĝoj el Orient.”

Depost la miraklo de l' pasinta jaro, kiam ili dum sia rondirado alvenis en loĝveturilo kaj tie trovis malriĉan viron kaj junan virinon kun ĵusnaskita infano ĉe kiuj ili, pro neklarigebla impulso kaj nekonata respekto, surgenuis kaj donacis siajn kolektitan monon kaj manĝaĵojn. Depost tiam Suskewiet komencis alian vivon. Ĉar li klare sentis, ke tiu infaneto estis Dio, kiu ĉiujare dum Kristnasko por unu tago ree venas en la mondon. Ha, li tiel bone rememoris, kiel ili vojeraris dum la sankta horo, vidis lumon sub la glacio, kvazaŭ lampojn, kaj aŭdis en la aero zumi la abelojn; kiom timemaj ili estis, kaj kia ĉiela dolĉeco kaptis lin kaj ankaŭ la aliajn, kiam ili ekvidis tiun infaneton, kaj kiamaniere ili propravole, sen interkonsento fordonis siajn malfacile akiritajn monerojn kaj manĝaĵojn.

Kaj ĉu ne ankaŭ ili aŭdis la malriĉan viron diri, kiam Pitjevogel demandis la vojon: „Tiam vi devas esti ĉi tie.” Certe tio estis la Sankta Familio. Li tion rakontis al la paroĥestro, sed ĉi tiu ne kredis lin, kaj la pedelo malŝate diris ke la ŝafisto estis nur trovito, kaj ke lia cerbo estis frostita.

Ĉie ajn, kie li rakontis, ke li vidis la Sanktan Familion oni mokridis pri li, kaj eĉ liaj du kamaradoj iom post iom forgesis la belan impreson. Kiam ili ankoraŭ pri tio pensis, ili ja diris: „Estis strange, jes, estis strange”, sed ili

ne plu okupiĝis pri tio, kaj faris ĉiutage pli grandajn pekojn por havi monon kaj brandon.

Sed Suskewiet ŝanĝis sian vivon. Ĉiam ja estis arda fajrero da pieco en lia koro, sed nun ĝi kreskis ĝis blanka fajro, kiu lin metis en ĉielan ekstazon, kaj plenigis lin per belaj, dolĉaj sentoj, tiel ke li preskaŭ ne plu sciis ĉu li vere vivas.

Li malbone zorgis pri sia vivo kaj forgesis la ŝafojn.

Ĉe la kampaj kapeletoj li surgenuis de tempo al tempo dum horoj, kaj kantadis, recitis naivajn preĝojn.

Li ankaŭ pentofaris por forviŝi siajn antaŭantajn pekojn, kaj ne timis, kiam frostis, truigi la glacipecojn kaj stari per siaj nudaj piedoj en la suferiga malvarma akvo.

Kaj kiam li trenis sian laman kruron malantaŭ la ŝafaro, li preĝis sian rozarion, kaj kiam li parolis kun kamparanoj, ne plu estis pri la vetero aŭ la terpomoj, sed pri Nia Sankta Virgulino, kaj la Infaneto Jesuo, kaj pri la profundeco de la peko.

La homoj, kiuj lin antaŭe nomis naiva, nun trovis lin tute stulta kaj klopodis lin eviti. Tio, kion li rakontis, estis bona por pastro, sed ne por iu, kiu estis samvestita kiel ili.

Kun granda deziro la maljuna Suskewiet atendis la novan Kristnaskon. Li ĉiam konservis la stelon, kaj renovigis ĝin ĉiujare. Ankaŭ nun li gluis sur ĝin koloran paperon kaj ornamis ĝin per staniolo, kaj sur la pintoj li alfiksis orajn rozetojn, postrestaĵoj de 50-jara edziĝjubileo. Li ne plu surmetus la altan ĉapelon, ĉar ĉe la ladisto li prilaborigis trovitan ladpecon al krono. Tio estus por li multe pli bela. Li estis laboranta pri tio, kiam la amikoj venis foje rigardi, ĉar ili aŭdis ke ankaŭ tri aliaj reĝoj estus elirontaj, kaj tiuj havas stelon kun sonoriletoj, kaj sekve gajnus pli da cendoj.

Sed Suskewiet ilin malfide rigardis kaj diris: „Mi nur kuniras kun la stelo, se ni donos al la malriĉuloj la monon kaj manĝaĵojn, kiujn ni rikoltas.”

„Ĉu vi estas stulta?” kriis Pitjevogel la angilkaptisto.

„Ĉu ni ne estas sufiĉe malriĉaj?” demandis la almozulo Schrobberbeeck kun siaj pusaj okuloj.

„Ne”, diris Suskewiet, „vi devas doni ĉion al Dio, kaj se vi donas tion al malriĉaj homoj, aŭ al Dio, tio estas egala.”

„Tiam ni restas hejme,” diris Schrobberbeeck; „aŭ ĉu vi pensas ke mi kantos por alia el ĉiuj fortoj? Tio estas ja bona por unu fojo!”

„Mi pli bone scias,” diris la sagaca Pitjevogel, „ni mem faros stelon, aŭ ĉu vi pensas ke ni ne kapablas tion? Bonan tagon, stulta Sus!”

„Agu laŭplaĉe,” kriis la paŝtisto post ili, „sed kun tiu stelo, kun kiu ni trovis Dion, vi ne kolektos monon por peki!”

La ĉielo muelis la unuan neĝon super la teron, kaj ĉiela feliĉego trafluis Suskewiet. Li iradus nun sola de farmodomo al farmodomo amasigi monon por la malriĉuloj.

Sed Suskewiet malsaniĝis kaj ne plu kapablis forlasi sian litaĉon.

Kristnasko venis. La paŝtisto ricevis la lastajn sakramentojn. Li vidis veni kaj foriri la paroĥestron kun ora surpriso. Vesperiĝis kaj la luno ekrigardis la blankan mondon.

La larmoj fluis sur la stoplaj haraj vangoj de Suskewiet, ĉar li ne povis festi Kristnaskon por la malriĉuloj.

Dum tridek kvar jaroj la stelo aŭdis liajn kantojn. Nun la morto venis sur lin. Lia koro preskaŭ ne plu vivis, sed lia malmulta spirito, de tempo al tempo, klare brilis.

La farmistoj iom restis ĉe li, sed dum lia ekdormo reiris al la hejmo, kie lumis la Kristnaskarbo, kaj estis bakataj la vafloj. Li kompate aŭdis ilian ĝojan bruon; oni ludis klarineton, kaj resonis kantoj.

Li ne plu vivus du horojn, kaj li petegis la ĉielon lasi ankoraŭ pasi la Sanktan Horon.

Lia maldika kaviĝinta kapo kuŝis kline, kaj tiel li alterne povis vidi la lunon

sur la ĉielo, kaj la stelon, kiu brilis en la angulo. Liaj manoj kuŝis nekovrite, grandaj kaj maldikaj, kun stumpaj fingroj.

Kiel li venis perдите en la mondon, kiel trovito, tiel li solece kaj forlasite mortus. Nur la bonaj ŝafoj restis kun li, kaj venis de tempo al tempo rigardi super la barilo.

Pli alten leviĝis la luno; iĝis pli malgranda dum leviĝado kaj pli pura ol arĝento.

Suskewiet preĝadis el ĉiuj fortoj, por ankoraŭ unu fojon travivi la favoron de Kristnasko.

Tiamaniere li longtempe tie kuŝis. Fine li vidis ĉi tie kaj tie apud la muelilo kapvestitajn virinojn, kun lanterno, direktiĝi al la vilaĝo. Ĉesis la bruoj en la farmodomo.

Iom poste li aŭdis la sonorilojn kaj la ludon de orgeno.

Komence li tion ne kredis; la preĝejo tamen estis trikvaronhorojn malproksime! Sed ne estis iluzio, orgeno estis ludata.

Ravaj, trenigaj, kantaj tonoj, kiuj malrapide kaj solene, malferme balanciĝis, ŝvelantaj de emocio kaj alta ekstazo. Tian belaĵon li estis neniam aŭdinta. Antaŭ ol reveni de sia miro, li aŭdis subite ke ĉiuj ŝafoj eklekis, kaj en la lunlumo, li vidis ke ili direktis la kapojn orienten.

„Tio estas la Sankta Horo!”, murmuris Suskewiet, malvarmiĝinte pro ekstazo.

„Dio! Dio! Mia stelo!” Li provis rektigi sin por ellitiĝi kaj preni la stelon, sed ne sukcesis.

„Mia stelo!” Li malespere kunigis ĉiujn siajn fortojn, puŝis per siaj piedoj la litkovraĵojn kontraŭ la flankojn de la lito, kaj tiam sin rektigis per la elstreĉitaj littukoj. Raŭka tusado surprizis lin, kaj post tio, kiam la ŝvito riveretis sur lia frunto, li pli antaŭen venis, elmetis siajn malgrasajn krurojn el la lito, ree tusadis, sed nun ne plu atendis ĝis tio finiĝis. Li rekte staris, sin apogis je la muro, kaj paŝeton post paŝeto li iris, kun fleksantaj genuoj al la stelo. Finfine li ree sidis sur la lito kun la lada krono sur la

kapo kaj kun la stelo en la brakoj.

Kaj post ripozado, li prenis la ŝnureton kaj rigardante en la lunnokto li kantis, raŭke kaj rompите, akompanata per la dolĉaj kantoj de la nekonata orgeno:

Ni estas tri Reĝoj el Orient'
Gvidataj de stel' al firmament'.
Ni ĉie ja serĉis en la mond',
Tra la kampoj kaj sur mont',
Kaj kie haltis stel' en val',
Ni ĉiuj alvenis al la stal'.

La larmoj gutetis de liaj vangoj, tremetoj traskuis lian korpon, kaj en liaj mortantaj okuloj de tempo al tempo, fulmis la fajro de lia ekstaza animo.

Sed kiu aŭ kio estis, tie malproksime?

Kernpura lumo glitis sur la lunheligita neĝo, pli kaj pli proksimen, rekte antaŭen, sen atente barilojn aŭ vojojn.

Suskewiet surprizite entenis sian spiron, sed mekanike tiradis la ŝnureton, kaj la stelo kraketante alterne turniĝis.

Pli kaj pli ĝi alproksimiĝis. Finfine ŝajnis esti tre malgranda infaneto en blanka ĉemizeto, la piedetoj nudaj: li portis terglobon en sia mano, kaj ĉirkaŭ lia bluokula ĉarma vizaĝeto kaj la oraj krispharoj, radiis ĉielarka aŭrorbrilo.

„Kiu estas?” murmuris Suskewiet, „ŝajnas al mi ke mi jam vidis tiun bubeton.”

Ĝi rekte venis al li, dum momento malaperis sub la fenestreto, kaj tiam malfermiĝis la pordo, kaj antaŭ li staris la infaneto, tiel freŝa kaj pura kiel kratagfloreto.

La stalo subite odoris kiel ĝardeno plena je rozoj.

„Bonan tagon Suskewiet,” diris ridetante, kaj konfide la infaneto, „ĉar vi ne povas veni al mi, mi venas al vi. Ĉu vi min ankoraŭ konas?”

Kaj sur la vizaĝo de Suskewiet radiis gaja surprizo, kaj rideto montris liajn du rompitaĵajn nigrajn dentojn. Li ride kapjesis, sed ne scipovis eligi ajnan vorton pro kortuŝo, kaj dume pendis la larmoj ĉe la krudaj haroj de liaj vangoj.

„Jes?” diris la infaneto. „Ĉu vi volas tiam daŭrigi vian kanton. Mi ja tiom ŝatas aŭdi ĝin”.

Kaj Suskewiet kun sankta respekto prenis la ŝnureton, kaj kantis, dum liaj okuloj plenaj de beata fajro, radiis en la roza brilo:

Kaj tuj Maria pro la bru'
Jam sopiris de enu',
Ĉar ŝi pensis: Herodes, jen,
Venas por kapti Jesueton.
Ŝi pensis: jen la kruelul'
por la vivo de l'etul'.

Kaj vidu, la nigra pomarbo, kiu tie ekstere staris ne estis blanka de neĝo, sed blanka de riĉegaj pomfloroj.

Kaj tie rigardis la ŝafoj super la barilo, kaj la postaj apogiĝis sur la dorsoj de la antaŭaj.

„Venu,” diris la infaneto, „ĉu ni kune iru al nia hejmo?”

„Ho jes, jes!” ridetis Suskewiet. Subite li estis kvazaŭ sanigita. Li volis surmeti sian pantalonon, sed li spertis ke ne estas tiel malvarme, kaj krom tio li ne havis tempon.

Li prenis la stelon, sekvis la infanon, la kolorbrilan infanon. Sed li ankoraŭ sin turnis al siaj ŝafoj, kiuj tiel insiste blekis.

„Ĉu tiuj ne povas kuniri?” li demandis, „mi estas ŝafisto.”

„Ju pli multe, des pli bone!” respondis la infano.

„Nu venu, karuloj, venu!”

Suskewiet malfermis la barilon, kaj ĉiuj sekvis, en densa amaso. Kaj tie ili iris en la arĝenta, blanka nokto. La infaneto iris kun sia malgranda mola maneto, en la granda mano de la ŝafisto, kaj kondukante la maljunulon tra la netuŝita neĝo. Li portis stelon, kiu radiis en la lunbrilo, kaj malantaŭ li venis la ŝafoj, kun la kapoj malsupren pro respekto.

„Tie estas!” diris la infaneto, montrante la malproksimaĵon, kie ora palaco, super ĝardeno en printempflorado, montris kupolojn kaj pinturetojn.



„Bele, bele!” diris Suskewiet en ekstazo, kaj malantaŭen rigardante al la ŝafoj: „Tie la herbo ja estos ankoraŭ multe pli bona, ĉu ne karuloj?”

Kaj tiam ili eniris.

Schrobberbeeck kaj Pitjevogel revenis de sia du reĝa ekskurso. Ili estis ebriaj pro la multaj glasoj da brando, kiujn ili dumvoje drinkis. Ilia krono malrekte staris sur la kapo, kaj la stelo estis rompita. Ili ŝanceliris brakon en brako kaj kantis maldecajn kantojn. Ilia vojo pasis laŭ la farmobieno.

„Ho,” kriis Pitjevogel, „Ni baldaŭ tintigos antaŭ li nian monon. Ne doni al ni sian stelon!”

Kaj kiam ili tra la fenestreto rigardis, ili vidis en lia ĉemizo Suskewiet, kiu sidis mortinta sur la lito, la lada krono sur la kapo, kaj la du homoj plene

konsternitaj, forkuris, lasante lian rompitan stelon.

La sekvantan tagon oni trovis Suskewiet; ĉiuj ŝafoj pastiĝis malproksime en la kampo.

En la stalo odoris je rozoj.

LA DEKSTRA PANELO

Kvankam la luno lumas tiel klare super la dike neĝkovrita ebenaĵo, kiu el si mem donas helecon, tamen la almozulo Schrobberbeeck kunprenas sian fajrantan lanternon, por iri al la noktmeza meso.

Estas pro timo je Dio.

Ne plu estas kiel la antaŭaj jaroj, kiam li tri reĝis en tiu ĉi tago kun siaj amikoj kaj turnis la stelon de farmobieno al farmobieno.

Estis la tago en kiu li havas plej multe da plezuro kaj gajnas plej multe da mono.

Li ektimas pro Kristnasko.

Tio jam komenciĝis antaŭ du jaroj, kiam li vidis kun Pitjevogel la fiŝkaptisto kaj Suskewiet la paŝtisto la Sanktan Familion en loĝveturilo, veninte de la tri reĝa rondiro,.

Kaj la postan jaron, li sole kun Pitjevogel faris la stel rondiron, kaj kiam ili duonebriaj revenis kun siaj intestoj plenaj de varmiga brando, ili vidis la sidantan Suskewiet, kiu depost la okazintaĵo pri la Sankta Familio, denove ekkredis, mortinta sur la lito, kun stelo en siaj manoj, kaj kun ĉiela heleco ĉirkaŭ si.

Kristnasko postulis ion de li; li sentis en ĝi la manon de Dio.

La timo senĉese turniĝis en lia koro, kaj pro timo li ĉiudimanĉe iris al la meso. Li timis ke io sankta okazus, kaj li pro tio ankoraŭ pli maltrankviliĝis ol pro la diablo, kun kiu Pitjevogel nun laboris. Ĉar la famo ekestis, ke, kiam la fiŝkaptisto pasintjare iris naĝi en la rivero Neto, fortega fulmotondro aŭdiĝis; la vestoj de Pitjevogel disflugadis kaj pro subita timo li senveste kuris tra la kampoj, kaj alvenis en dometon, kie maldigna eksparohestro loĝis, kiu kun la diablo kunlaboris.

Tiu unuavide pensis ke estas la diablo, ĉar tiel la korpo de Pitjevogel estis plensemita de nigraj haroj, kaj li alparolis lin: „Satano, saluton!” „Mi

estas nur Pitjevogel,” diris honteme la fiŝkaptisto. La pastro estis perfidita, kaj instruis al Pitjevogel la nigran arton, laŭ la fama libro „La Nigra Ambrozio”.

Depost tiu tago la fiŝkaptisto elspezis tiom da arĝenta mono, kiom oni povis imagi al si, sed li devis esti ĉiutage hejme antaŭ la sunsubiro.

Pitjevogel, kiu alie en la freŝaj somernoktoj fiŝkaptadis en sia boato, kiam la angilo bone mordas, estis ne plu vidata post la ekbrilo de la steloj, kaj ne ekzistis plezuro sufiĉe forta por logi lin el lia dometo, kiam vesperiĝis.

Kaj evitis lin Schrobberbeeck, kiu alie tre amis Pitjevogel, ĉar la hometo povis ridigi vin ĝislarme.

Li evitis lin por ne altiri sur sin la atenton de Dio.

Li tamen ne malpli forrabis, tio ja estis kvazaŭ ennaskita en li; li ne povis lasi kuŝanta kion li kapablis kunpreni. Kaj li vagis tra la regiono, almozpetis en la farmobienoj: neglektis siajn pusajn okulojn, tiel ke nenio plu restis ol flavblanko, kaj recitis tiam unutonon rozarion.

Li ankaŭ ricevis loĝejon, nome lignan rifuĝejon, en kiu antaŭe la farmisto Waterschans enmetis la kampilaron. Ĝi ne plu estis uzata, sed Schrobberbeeck loĝis, dormis, vivadis en ĝi, kaj tie li provizis sin per ĉio, kion li povis almozpeti kaj forrabi. Li havis eĉ en ĝi peceton de spegulo en kiu li povis vidi sian ruĝgrizan vizaĝon kun flavruĝa stopla barbo. Tra la dometo pluvis, la ventoj skuis ĝin kiel elpendaĵon, sed li havis la fierecon posedi ĝin, kaj eĉ faris ĝardeneton, tiel grandan kiel tabloplataĵo, por kulturi en ĝi rafanetojn.

Sed ankaŭ li vespere neniam eliris, pro la sankto, kiu ŝajnis persekuti lin.



Kaj kiam li dumtage almozpėtis tra la regiono, li nun demetis antaŭ ĉiu Sankta Virgulineto sian malfreŝan ĉapelon, ĉiam pro la sama kialo, por esti en la bonaj rilatoj kun Dio. Kaj, en la regiono troviĝis multe da Sanktaj Virgulinobildoj, eĉ dudeko. Ili staris en siaj ŝtonaj, lignaj aŭ gipsaj formoj; unuj en ŝranketoj, pendantaj de arbo, aliaj sur stango aŭ en ŝtona kapeleto.

Kaj danke al tiu salutado ĉiutaga, li konis ilin ĉiujn; li parkere sciis kian koloron ili havas, kiom grandaj ili estas, kiel ili nomiĝas, kaj por kiu savo ili helpas.

Li ĉiujn konis, de la granda Nia Sinjorino de Sep Doloroj el la Begin-arbaroj, ĝis la fingrogranda Nia Sinjorineto de l' Silento, staranta en birdnesto de fulmofendita saliko.

Kaj li konis ankaŭ la grandan Kriston sur la Kruco, apud la lageto, el kiu la bovinoj trinkas.

Kun maltrankvilo li atendis Kristnaskon, timante ke ree io sankta okazus al li. Li unue intencis pasigi la nokton en „La Sireneto”, la trinkejo. Li pensis ke en gastejon, kie oni blasfemas kaj trinkas brandon, Dio ne venas. Sed tiam li denove timis ke, se li tion farus, en alia nokto, la puno ne forrestus.

Ho, kien iris la almozula kvieto? Li, kiu alie vivadis plenĝue de unu tago en la alian!

Sed Kristnasko pli kaj pli alproksimiĝis. Li ne kuraĝis iri kun stelo, malgraŭ dezirego, ĉar li pripensis ke ne estus bone por li rondiri kun stelo, kaj li ekhavis ideon iri al la noktmeza meso. Ne pro amo, kredo aŭ pieco, sed por forigi la misterecon de si. Kaj por havi pli da fido en la blanka, lunheligita izolaĵo, li lumigis la nenecesan lanternon kaj iris al la malproksima preĝejo.

Li ja volis kuri kun fermitaj okuloj, por nenion vidi de la stranga, solena neĝnokto, kiu lin rigardis kiel streĉita katokulo, en kiu interne sulfuris.

De malproksime aŭdeblis la sonorilo, kaj li serĉis aliajn homojn, kiuj ankaŭ iras al la meso, sed neniu estis videbla. Li tutsola estis sur la vojo. Lia koro batis, kaj li sentis sin pli kaj pli malgrandiĝi kvazaŭ dronante en

la lunheligita, blanka izolaĵo. Kiam li preterpasis la nigran neĝkovritan muelejon, la malproksimaĵo ŝajnis ankoraŭ duoble pli for, kaj la timo, kiel premilo, kuntiris lian koron.

Li marŝis tiel rapide kiel li povis, sed ne kuraĝis kuri. Kial li ne kuraĝis kuri?

Ha, tie li venis al la arbo en kiu pendas la Sankta Virgulineto de Helpo, porcelana bildeto kun oraj lilioj sur la vesto. Tio donis al li fidelon; li demetis sian ĉapelon kaj petege suprenrigardis. Sed la Sankta Virgulineto ne plu estis tie! Kaj ĵus kiam li iris aĉeti lanternoleon, ŝi staris ankoraŭ en sia ŝranketo! „Falinta,” li pensis, sed la neĝo estis glata kaj senmakula; li nur vidis spurojn de museto, ŝajne kurinta sur la neĝo. Estis enpremoj de malgrandaj paŝetoj.

„Verŝajne forŝtelita,” diris Schrobberbeeck, kaj rapide pluen iris.

Li trapasis la ŝoseon por esti en la preĝejo pli rapide. Li intencis ĉe la ponteto trans la rivereto saluti Nian Karan Sinjorinon de Pieco, kiu staras sur stango; sed ankaŭ tiu ĉi ne estis tie! Li ekstaris mirigite, la sonorilsonoj ekmortis kaj denove la silento, la mistera silento premis sur la lando. Li lumigis kaj denove vidis la postsignojn de malgrandaj paŝetoj en la neĝo.

La ŝvitperloj ekbrilis sur lia frunto. Sed nun li ja kuris! Ha, la mirindaĵo alvenis, ekĉirkaŭis lin.

Kaj meze en sia timo li estis virine scivola ĉu la Nia Kara-Sinjorino-bildo de la Bona Morto troviĝas ankoraŭ en la ŝtona kapelo, malantaŭ la kradaĵo.

Ne, ŝi estis for! La spirala piedestalo, de artefarita marmoro estis malplena; ĉirkaŭe sencele staris la arĝentaj floroj sub la vitraj kloŝoj; la vaksaj kaj bluiĝintaj, arĝentaj eksvotoj ², kaj la nigre fumaĵitaj anĝelkapetoj.

Schrobberbeeck neniam tiel rapide kuris, sed kiom ajn rapide li kuris, li tamen kuraĝis rigardi al ĉiuj Nia Kara Sinjorino, kiujn li preterpasis, sed ĉiuj estis for!

Io okazis, jes io terure sankta okazis!

Kiam li venos malantaŭ tiun ĉi abiaron kun ĝia rando de arĝentaj betuloj, li vidus la preĝejon kun ĝiaj fenestroj bele kaj invite lumigitaj.

Ĉiumomente eksonus la dekdua.

Li kuris laŭlonge de la silentaj misterplenaj abioj. Li ne plu havis la kuraĝon suprenrigardi. Ankoraŭ duonminuton, kaj li vidus la preĝejon kaj la domojn, kaj tiam la danĝero finiĝus.

Subite li aŭdis bruon venantan je lia maldekstra flanko, kaj jen tra la neĝo alkuris malgranda spireganta figuro, alta je duonmetro. Ĝi surhavis ruĝan veston kaj helbluan neligitan mantelon, kaj en la sopiranta brusto estis sep ladaĵaj glavoj !

„Nia Sinjorino de la Begin arbaroj !” balbutis Schrobberbeeck. Kaj li kvazaŭ mortfalis pro timo, kiam neatendite la statuo al li venis, kaj per tutsimpla maltrankvila voĉo, kun nenio sankta en ĝi, al li kriis: „Ha, Sinjoro Schrobberbeeck, plej bona amiko, vi, kiu ĉiam salutas min, kiam vi pasas preter min, helpu min! Mi jam horon kuras, miaj piedetoj tiom suferas! Mia koreto rompiĝas, portu min, mi petas, al mia krucumita Filo apud la lago! Alie mi tro malfrue alvenos por festi lian Kristnaskfeston!”

Kaj ŝi petege etendis siajn brakojn, la mantelo falis en belaj faldoj, kaj violodoroj ĉirkaŭe papiliumis.

Schrobberbeeck staris rigide pro timo, li balbutis, sed ne scipovis eligi vorton. La sanktego reestis tie en plena terureco! Li mute kaj sence ŝin rigardis; liaj haroj altiĝis sub la ĉapelo, kaj liaj okuloj elkaviĝis el la pusaj randoj.

Sed Nia Sinjorino senespere plue petegis: „Ho, portu min, Sinjoro Schrobberbeeck. Vi povas rapide kuri, mi pezas kiel plumo. Se mi devas iri sola, ankoraŭ daŭros horon, kaj tiam la festo estos finita! Ho, helpu min, mi ĉion faros por vi. Mi ja ne povis foriri, vi sciu, ĉar homo preĝadis antaŭ mi ĉe mia kapeleto, ho, iu kiu vendis sian animon al la diablo por iom da arĝenta mono, iu kiu dum fulmotondro venis ĉe maldigna sacerdoto kaj tie lernis la nigran arton. Ho, la homo tiom petegis pri mia kunhelpo, meze en la profundo de la nokto, por savi lin de la diablo, kiu

staris malantaŭ li, kiel serpento, rekte sur la pinto de sia vosto. Mi tamen devis unue helpi, ĉu ne, Schrobberbeeck ? Ho, estis terura lukto inter mi kaj la serpento, por savi la viron!!!”

„Kaj ĉu Pitjevogel estas savita?” demandis Schrobberbeeck subite konfide.

„Jes,” diris Nia Sinjorino de Sep Doloroj, „sed portu min nun al mia filo apud la lageto.”

Nun bela lumo ŝovis sin sur la animon de Schrobberbeeck. „Ha, Kara Sinjorineto,” li refutis, „mi ne meritas vin porti, mia animo estas tiel nigra kiel miaj piedoj !”

„Mi lumigos ĝin ĝis ĝi brilos! sed portu min nun, portu min nun!”

„Se nur estas tio!” diris Schrobberbeeck, kaj li suprenprenis Nian Sinjorinon, portis ŝin kiel infanon, surbrake, kaj rapidis kiom liaj longaj kruroj povis, tra la malhela abiaro, tra la kampo, en la direkto de la lageto.

Tie la kruco staris en dolĉa lumo!

„Lasu min nun, kaj dankon, Schrobberbeeck!” Konfuzite li teren metis Nian Sinjorinon, kiu rapide forkuris.



Estis kvazaŭ Schrobberbeeck enirus en la ĉielon, tiel milde estis al lia koro, dum li portis tiun ĉi statuon. Kaj aŭtomate li pluen kuris, kaj kion li tie vidis? Li surgenuis pro ravo.

La kruco estis lumigita, kaj Kristo ŝajnis viva korpo, kaj en duonrondo antaŭ la kruco kolektiĝis ĉiuj Niaj Sinjorinoj de la regiono. Ĉiu en sia grandeco, sed nun kun veraj, ne pentritaj, ŝtonaj aŭ lignaj vestaĵoj.

Li konis ĉiujn, la porcelanan de Helpo, la gipsan de Pieco, tiun de la Kvin Vundetoj, tiun de la Bona Morto, tiun de la Ruĝaj Rozoj, tiun de la Geamantoj, tiun de la Bona Pano, tiun de la Purgatorio, tiun de la Tritiko, tiun de la Terpomoj kaj Pluvo, ja eĉ la fingrograndan de la Silento, kiu tute antaŭe staris, pro sia malalteco, ĉiuj ili tie atendis. Ili klinis la kapojn al la abiaro, sed tiam ili vidis Nian Sinjorinon de Sep Doloroj alkuri, kaj sammomente ĝoja moviĝo venis inter la dudek kvin vivantaj bildoj. Kaj, kiam tiu de Sep Doloroj estis preninta lokon en la mezo, ĉiuj surgenuis kaj etendis siajn manetojn laŭdante sian ĉielan Filon, kiu malfermis siajn belajn okulojn kaj ĉiujn ame alrigardis.

En la rondo de lumo, Schrobberbeeck vidis kiamaniere la vundo en la brusto de Nia Sinjoro Jesuo fendiĝis kiel vinbero, kaj malrapide sangis.

Kaj Schrobberbeeck demandis ĉu tiel ĉiam daŭri povus, ĉar tio estis la ĉielo.

La sekvantan tagon, ĉiuj Nia Sinjorino staris en siaj ŝtonaj aŭ lignaj formoj, en siaj ŝranketoj, arboj kaj kapeloj.

Sed antaŭ la kapelo de Nia Sinjorino de Sep Doloroj, en la Begin arbaroj, oni trovis mortintan Pitjevogel ; surgenuie kun siaj manoj kramfe premitaj ĉe la feraj stangoj de la krado.

Flava vipereto, kiuj tiom are vivas en la Begin arbaroj, kuŝis apud li ankaŭ mortinta, kun ŝirmalfermita ventro, teruriga vidaĵo.

Schrobberbeeck nun estis tute alia homo, intime en sia koro. Li ne plu timis, li deziris pli da tiaj altaj momentoj. Li eĉ atendis ilin dumnokte, kaj rigardis serĉante ilin en la preĝejo.

Sed ekstere li restis la sama, loĝis en kaduka domaĉo, almozpatis, kaj kion li povis forrabi, tion, kio ne estis tro varma aŭ peza, li ne lasis kuŝi.

Tio ja estis bakita en li, kaj tion ankaŭ laŭ plej forta kredo ne povis eligi.



La supran bildon Felix Timmermans desegnis speciale por la Esperanto-eldono.

Tabula Gratulatoria

La libro aperas dank' al la kontribuo de diversaj personoj, kiuj apogis nin, kaj krome dank' al multaj esperantistoj, kiuj antaŭmendis la libron.

Ria De Cleyn, Antwerpen

Erik D'Hondt, Erembodegem

Ivo Durwael, Edegem

Jos T. Gouwy, Turnhout

Gerd Jacques, Antwerpen

Fernand Piot, Baal

Carlos Roels, Oostende

Fernand Roose, Brugge

Andre Ruyschaert, Itzig (Luksemburgo)

Jozef H.M. Vanbrabant, Ieper

Johannes Van Coppenolle, Sint-Truiden

Jean-Pierre Van den Daele, Eupen

Louis Van der Zijp, Brasschaat

Lucien Vandoorne, Wortegem

Marie-Louise Vanherk, Brussel

Daniel Van Herpe, Oud-Turnhout

Georges Van Overloop, Ruisbroek

Jules Verstraeten, Hoboken (Antwerpen)

Notoj

Tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la plena versio de tiu ĉi libro, kiu estas akirebla ĉe www.retbutiko.be

Kolofono

Titolo: Cecilja. Tri poetaj romanetoj

Aŭtoro: Felix Timmermans

Kovrilo: Hugo Fontyn

Reviziis: Nora Caragea kaj Lode van de Velde.

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts.

ISBN: 978 90 71205 81 9

UDK: 82.3.892

NUR: 340

Leĝa depono: D/1999/2924/4

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2000 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de "Cecilja" estas nur provversio kaj rajtas esti libere kopiata.